

esperanto aktuala


Revuo de la Esperantista Brusela Grupo

Numero 3 / 2013



Kiam ? Inter 22/4-12/5/2013

Programata estas i.a. 'kia lingva diverseco?', muziko en diversaj lingvoj, lingvobataloj de minacataj lingvoj, la kreola en la muziko, Bruselo babelo, la lingvo de la kolonigisto, ... **Ekolingvistiko kaj Esperanto ĝis nun ne estas pritraktataj temoj.** Prof. Mark Fettes en ESPERANTO (UEA) : "Dum mi tralegis la septembran (UK-an) numeron de Esperanto-revuo por 2012, mi trafis la paroladon de Mark Fettes. Ĝi enhavis la jenajn frazojn, denove legindajn rilate je PIP:_Ni [...] laboras por mondo kiel eble plej multlingva kaj multkultura, kie la diverseco de la homaro kompletigas la biologian kaj ekologian diversecon de ĉi tiu mirinda planedo. Ni ne ĉesu diri tion, ĉiam pli laŭte, pli klare, pli konvinke. *Sed* se tia estas nia rolo, ĝi kunportas ankaŭ respondecon. Ni ne rajtas facilanimi pri nia lingva supereco. Ni devas klerigi nin pri socia multlingveco kaj komenci vidi Esperanton ne kiel solvon, sed kiel elementon de paca, justa kaj daŭrebla lingvopolitiko por la disvolviĝo de plurlingvaj socioj en ĉiam pli interplektita mondo."



EKOLINGVISTIKO : Prof. Velimir Piškorec (univ. Zagreb, Kroatio) : *Ekolingvistoj interalie pritraktas lingvan diversecon kaj aktive klerigas pri la bezono aktive protekti tiun diversecon. Aliflanke oni ankaŭ atentigas pri dominado de «grandaj» lingvoj kiuj «manĝacas» malgrandajn lingvojn kaj pri la el tio rezultinta lingva malegaleco kadre de internacia komunikado. En tiu punkto oni povas vidi ligilon al interlingvistiko, kiu el la perspektivo de neŭtrala internacia komunikado pritraktas pli-malpli similajn temojn"*

Herman Deceŭninck



Por partopreni tiun elsendon aŭ por havi ĉiajn informojn, bonvolu kontakti (antaŭ la 6a de Majo) :

souslespavesbruxelles@radiopanik.org



K O L O F O N O

38a ELDONJARO. **Redaktoroj** : Laurent kaj Samy Loisse : aktuala@esperantobruselo.org ;
 Fondita en 1976, de Léo De Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo «Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge» kun la n° 0419498274, honorigita kiel reĝa societo ek de la 29a de Majo 1957. **Aktuala estas libere elŝutebla tie** : <https://sites.google.com/site/ebgaktuala/>
Prezidanto : Angelos Tsirimokos prezidanto@esperantobruselo.org ; **Kasisto** : Jan Amadori jan.amadori@gmail.com
Sekretario : Laurent Loisse sekretario@esperantobruselo.org , **Informoj / kursoj** : Françoise Pellegrin fransuaz@esperantobruselo.org
Eventoj : JM Nicolas de Buyl nikolao@esperantobruselo.org **Retejo de EBK** : www.esperantobruselo.org
Abona membriĝo : 10 aŭ 13 eŭroj jare, konto : **IBAN** : BE87 5230 8055 0794, **BIC** : TRIOBEBB de la Esperantista Brusela Grupo
Kunvenejo : rue Van Maerlant 2, 1000 Bruselo Metroo Maelbeek ĉiumerkrede 18h30-20h00 - Tie nek poŝtkesto, nek telefono .
 Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala ne nepre spegulas opiniojn de la ĉefa redaktoro aŭ de EBK - Esperantista Brusela Grupo

A G E N D O



Bonvolu kontroli la ĝisdatigojn sur nia nova retejo : www.esperantobruselo.org

Kursoj kaj kunveno okazas ĉiumerkrede en nia kunvenejo en la konstruaĵo de la Eŭropa Komisiono, Rue Van Maerlantstraat 2, 1000 Bruselo. **Ne kursoj, nek kunveno la 1/05/2013.**
 Novuloj, bonvolu sin anonci al fransuaz@esperantobruselo.org aŭ telefone +32 2 358 27 28

MAJO

- Merkredo la 1a** **13:30 - 18:00** **Vizito de Apoteka Ĝardeno en Lessines**
 i Monique VAN ROY (068/54 27 28) prefere frumatene aŭ Catherine ROYAUX (010/45 19 21) - cat.royaux@netcourrier.com
- Vendredo la 17a ĝ. dimanĉo la 19a** **17:00 - 14:00** **PEKO 2 en Wépion (BE)** Centro La Marlagne.
 i www.esperanto-wallonie.be aŭ +32 485 517 552 (ĉe Valère)
- Sabato la 25a** **11:00 - 20:00** **ESPERANTO-KAFEJO en OSTENDO**
 i Pliaj informoj ĉe Marc Cuffez : flandrio@hotmail.be aŭ Flory Witdoeck : flory2@witdoeckt.be aŭ telefone 059/702914
- Dimanĉo la 26a** **9:00 - 18:00** **Promenado en la Flandraj Ardenoj**
 i Tel. 051 62 39 28 retadreso: piet.glorieux@gmail.com

JUNIO

- Sabato la 8a** **9:00 - 13:00** **KER-ekzamenoj (Gento)** <http://www.edukado.net/ekzamenoj/ker>
 i Katja LÖDÖR lodorkatja@skynet.be
- Sabato la 15a** **Eskapadoj en BRUSELO : Mini-golfo Woluwe**
 Aliĝu antaŭ la 12 de Junio ĉe mlaitat@yahoo.fr aŭ 0486 96 92 14
- Dimanĉo la 23a** **13:00** **Koncerto de Nikolin** en «L'Espace des 4 Saisons» (147 rue F. Desmedt, B-1150), okaze de la malfermo de ekspozicioj (Ceramikaĵoj de Claire Chuet, ...). Senpage.

Esperanto en Kantono (*Guǎngzhōu - Ĉinio*)

La 9an de Marto komenciĝis kurso de Esperanto, por universitataj gestudentoj, kun la ĉeesto de 12 el ili, speciale elektitaj pro ilia akademia kvalito. Ĉiuj montris sian pretecon rapide kaj serioze lerni la internacian lingvon.

La instruisto estas Augusto, el Hispanio.



Saluton Kara Legantaro !

En **2015**, la franca -najbara kaj agrablaurbo **Lille** bonvenigos la centan Universalan Kongreson de Esperanto ! La elekto de tiu urbo ne estas tute hazarde : *Lille* estas la ĉefurbo de la regiono kie la unua UK okazis, en la urbo *Boulogne-sur-Mer* en 1905 (dum la 2 mondmilitoj, la UK-oj ne povis organiziĝi).

Ni elkore kuraĝigas la organizontojn pri tiu grava evento !

Ni salutas ankaŭ nian samideanon **David Trembla** kiu pentris la kovrilbilon okaze de lia «mond-gazetar-revuo» ĉe :

<http://hodimondo.blogspot.be/>. David regule redaktas artikoletojn por tiu blogo. Ĝi temas pri mondaj novaĵetoj - ĉefe politikaj. Iu ajn povas uzi tiujn novaĵetojn por sia blogo/radio-elsendo/ttt-ejo, ... Tiu ĉi kovrilbildo estas la oficiala vizaĝo de Hodimondo.



En tiu epoko de monda prirabado far kapitalisma logiko, de «klas-milito» (laŭ Warren Buffet, jes ja, almenaŭ unu klaso konscias ;-)), ... indas ankaŭ havi pliprecizan kompason. Feliĉe ĝin «*Le Monde Diplomatique*» monate havigas nin Esperante per taŭgaj analizoj. Kaj kelkfoje ravigas nin per pli malkutima teksto kiel tiu de Eduardo Galeano : «*Voĉoj de la Tempo*». Ekde nun, ni aperigos ĝin en Aktuala, rubriko post rubriko (paĝo 19).

Bonan legadon,

Laur' kaj Samy

aktuala@esperantobruselo.org



Enhavo

Paĝo 2 :	Lingvoj ĉe Radio Panik
Paĝo 4 :	Eventoj
Paĝo 5 :	Esperantista lernejo en Togolando
Paĝo 6 - 8 :	FESTO 2012 Memoraĵoj
Paĝo 9 :	Vojaĝo per biciklo
Paĝo 10 - 11 :	Ateista persekuto k diskriminacio
Paĝo 12 - 15 :	La estonteco certe ne estos enua
Paĝo 16 - 17 :	Amikejo
Paĝo 18 - 19 :	Pianisto Pablo Pelaez
Paĝo 20 :	Verdaj skoltoj



Esperantista lernejo en Togolando

Kara samideano,

Certe vi aŭdis pri Zamenhof....

Same kiel ni, anoj de eta farmbieno en francaj pireneoj, kiu proponas natur-restadon en nia domo por infanoj dum feriatempo. (rete : www.la-maraude.fr retpaĝo konstruantante...)

En 2004, allogitaj de multnombraj adresoj en Pasporta Servo en TOGOLANDO, ni decidis konatiĝi kun la tieaj esperantistoj, kaj tiel malkovris konstruantan « Insituto Zamenhof » (IZo).

Por esperantisto, temas pri profunda emocio malkovri en tute malriĉa kvartalo de Lome, la ĉefurbo, tiom grandan, aŭdacan projekton.

Hodiaŭ Insituto Zamenhof en Lome, akceptas 603 gelernantojn, inkluzive 85 plenkreskulojn dezirante lerni skribi kaj legi. Ili sekvas la oficialan ŝtaprogramon, kaj krome lernas esperanton.

Laŭ ni, temas pri la plej grava iniciato pri Esperanto, ĉar vi tuj komprenos ke ĉiujare, dekoj da homoj en Lome lernas Esperanton. Kaj ne nur la lingvon, sed ankaŭ, eble la plej gravan, la « internan ideon » de Esperanto celante fratecon, malfermon sur la mondo, egalecon, amikecon, respekton, sindonemon....ĉiujn belajn valorojn por kontribui al pli justa mondo.

Ni, modeste kreis asocion por subteni Izon, kaj ni povas fieri kunigi 53 subtenantojn, kaj bone malbone, ni sendas al Izo po 5000 € jare. (ĉiu laŭ ebleco donas inter 20 €, 50 €, 100 € kaj eĉ ĝis 300 €...)

Jam bela sumo, kiu, bedaŭrinde malsufiĉas.

Tial, ni dezirus konatigi tiun-ĉi lernejon al la esperanta mondo por ebligi ĉiujn, kiu

opinias ke valoras subteni niajn geamikojn en Afriko, partopreni la subtenon.

Nia asocio nomiĝas « Une école au Togo », kaj, ĉar ni supozas ke vi rilatas kun sufiĉe multaj esperantistoj en via rondo, ni dankas vin priparoli ĝin, konatigi ĝin, kaj inviti homojn partopreni !

Evidente, ni komprenas ke vi postulos pli da informoj, kaj ne hezitu, ni plezure klarigos al vi ĉion, kion ni povos.

Tamen, ni kreis etan retpaĝon kiun vi jam povas viziti : uneecoleautogo.jimdo.com
Multan dankon pro via atento, ni nepre atendas vian respondon !



Sincere via,
Marie, Evelyne kaj Jean-Pierre

Association une Ecole au Togo
09800 ARROUT
Tél : 05.61.96.82.08
uneecoleautogo@neuf.fr



FESTO 2012

Por atingi FESTOn 2012 necesis veturi tra la Ĵurasa montaro kaj veni al la skistacio de Métabief piede de la Ora Monto (Mont d'Or) ĉe la limo inter Francio kaj Svislando. Estas belega montara loko kaj ankaŭ relative disa kun tamen la koncertejo en la centro. La suno kaj la bela vetero ankaŭ varmigus la etoson kaj ebligis al la partoprenantoj sunumi, bani sin en montaraj lagoj kaj ekskursi en la montaro, en la urboj Besançon kaj Neuchâtel en Svislando.

La interkona vespero okazis vendrede, la 17an de aŭgusto, kaj konsistis ĉefe el ludoj kaj poste estis malfermo de la trinkejo kun fona muzika etoso, kaj homoj babilis ĝis ne tro malfrue post noktomezo.

Sabate vespere la koncerto de Zhou-Mack Mafuila donis viglan kaj varmdancigan tonon laŭ la ritmoj de la Afrika rumbo kaj regeo por la malfermo de la arta programo de FESTO 2012.



Zhou-Mack, ĉefkantisto kaj ritmgitaristo, estis akompanita de ses muzikistoj. Ili prezentis plejparte kantojn el la Esperanto-albumo *Originoj*. Kelkaj kantoj estis en la lingala kaj kikonga lingvoj, afrikaj lingvoj el Kongo. La publiko estis ĉarmita kaj kontribuis dancante kaj kunkantante la rekantaĵojn. Post la koncerto DJ Leo startigis la diskejon kiu dancigus homojn ĝis la 4a horo.



Dimanĉe *Espo Despo* el Kopenhago okupis la scenejon kvarope. Ilia miksaĵo de popolmuziko kaj roko kun Balkanaj influoj surprizis la ĉeestantaron, kiu reagis dancante, kaj Amir, la kantisto kaj gitaristo de la bando, entuziasmigus la publikon kiu plu volis kaj repetis pliajn kantojn ĉe la fino.

Sekvis ilin *Stoic Drama*, roka triopo el la proksima urbo Belfort kun vigla rokkoncerto. Elstara kaj peza sono de gitaro, baso kaj drumo de junaj muzikistoj tre promesplenaj... La voĉo de la

kantistino-gitaristino estis sorĉa kaj tre bone kongruis kun la muziko. Tuj sekve la koncertejoj transformiĝis je diskejo de DJ Leo, kiu sonigis ĝis la 5a matene.



Lunde, la 19an, la vespero disvolviĝis laŭ kabareda etoso per koncerto de Gijom ĉe voĉo kaj piano akompanata de *Espo Despo* akustike. La rezulto estis elstara, kaj tiu kunludado alportis alian dimension pro la muzikaranĝoj al la repertuaro de Gijom, kiu kutime akompanas sin de nura piano...

La dua parto estis koncerto de *Dolĉamar*. Por tiuj, kiuj konas *Dolcxamar* kun X kaj *Dolchamar* kun H, estis vera surprizo la nuna versio de *Dolĉamar* kun Ĉ. La nova *Dolĉamar* konsistas el Pieĉjo (Patrik Austin) kiu ne plu ludas sursceneje kutimajn instrumentojn sed elektronikaĵojn kun kantoj el la albumoj *Lingvo intermonda* kaj *Trajn' nenien*. La muziko elektroniĝis laŭ la aktuala danciga klubeca stilo. La publiko remalkovris malnovajn kantojn de *Dolcxamar* kaj *Dolchamar* sub alia sono-vesto kaj malgraŭ tio ili kunkantis kaj dancis. Tiu nova muzikvojo de la artisto ankaŭ malfermas perspektivon por nova muzikĝenro en Esperanto kaj antaŭvidigas prilaboron de nova albumo de *Dolĉamar* post pli malpli du jaroj. Post la sukcesa koncerto, DJ Leo revenis por reaktivigi la diskejon.



Marde okazis regea vespero kun Jonny M, kiu koncertis kun la asisto de DJ Leo ĉe miksiloj. La stilo de Jonny M, kvankam regea, malsimilas al tiu de Zhou-Mack Mafuila, ĝi havas pli elektronikajn sonojn kaj foje randas ĉe la limoj de hiphopo.



Jonny M ardigis la scenejon, la publiko bonege akceptis la artiston kaj kunludis kun li, reeĥante lian entuziasmigan energion. La publiko kaj la artisto kunfandiĝis. Post la koncerto DJ Leo faris sian lastan diskejan vesperon ĝis la 2a nokte.



Merkrede prezentiĝis la loka artisto Billy Fumey, kiu kantis en la arpitana (francprovenca lingvo). Billy akompanas sin per akustika gitaro kaj revivigas per siaj kantoj la arpitanan lingvon laŭ folka stilo. Postkoncerte homoj gufumis ĉe la fajro ĝis malfrunokte.



Ĵaŭde, la 22an de aŭgusto, estis la lasta tago de FESTO.

Vespere la kvarpersona Pariza teatrotrupo *Kvak* prezentis la teatraĵon *Karotkapo* de Jules Renard.

La aktoroj bonege interpretis la rolojn.

Post la spektaklo ekis internacia vespero, en kiu la organiza teamo sin prezentis kun la helpantoj kaj kunlaborantoj, kaj pluraj partoprenantoj muzikis, kantis kaj skeĉis. La belgaj partoprenantoj (*NdIR : Ni ! :-)* prezentis *Amikejon* en Belgio, kie okazos FESTO 2013 – la unua post la fino de la mondo!

Raportis festece por vi, **Flo!** / Fotis Flo! kaj Sjoerd Bosga@

Papere: La Ondo de Esperanto, 2012, №10.

Retre: *La Balta Ondo* <http://sezonoj.ru/2012/09/festo/>



Hotelo Esperanto malfermiĝis en Bialistoko

Nova hotelo "Esperanto" estas malfermita en urbo Bjalistok, laŭ vortoj de majstroj -- "loko kie pasinteco renkontas estontecon, inspirita de la kreinto de la lingvo esperanto -- Ludoviko Zamenhof".

La hotelo situas en centra parto de urbo Bjalistoko, apud palaceto de Branicki, ankaŭ konata kiel la Versaĵlo de Podlasie, kun lia bela baroka ĝardeno, kaj la same belega Planty Parko ankaŭ. Ĝi proponas 34 unu kaj dultaj ĉambroj kaj du komfortaj apartamentoj, bankeda salono por 300 personoj, 2 konferencaj salonoj por 50 kaj 100 personoj kun kompleta aŭdvida aparataro. Hotelo estas adaptita al bezonoj de handikapuloj. Estas uzata subtera parkejo.

Tranokto en 1-2 litaj ĉambroj de la hotelo kostas de 270 ĝis 360 polaj zlotoj, en apartamentoj -- 450-600 zlotoj. En restoracio Kawelin oni povas gustumi matenmanĝojn kaj uzi bazan menuon, kiun ĉefkuiristio Arkadiusz Błażowski kolektis en tradicio de pola kuirarto.



Plia informo troveblas ĉe la hotela retejo

<http://www.hotelesperanto.net>

kiu, bedaŭrinde, estas nur en pola kaj angla lingvo. Lingvo estperanto en retejo de la hotelo Esperanto tute mankas.

Vojaĝo per bicliklo tra la mondo de Cirilo kaj Roz'

16/03/2009
- 06/04/2009




Francio

▷ Niaj gastigantoj kontaktis la lokan ĵurnalon por intervjuo de ni. Ni ankaŭ prelegas en bazlernejo, kie 69 infanoj tre scivolemas pri niaj aventuroj. La lernestrino spontane akceptis nin. En la vespero estas tempo fari same en lernhelpa centro.

Dum nia restado en Saint-Raphaël, kiel ni planis, Cirilo devas retraĵni al Parizo por du tagoj pro prilaboraj motivoj. Estas okazo por reveni kun plia ekipaĵo... ni jam portas po bagaĝojn 30-kgajn. Malbonŝance, li foorgesis sian USB-memorilon. Ĝi tamen estas nepre bezonata, ĉar ĝi entenas niajn fotojn, rakontojn, kontaktojn kaj precipe la liston de menditaj poŝtkartojn. Ni do ĉi-momente ne plu povas sendi la jam pagitajn kartojn...

Sen trovi solvon al tiu problemo ni tuj restartas. Ni iom malfrue alvenas en Nico, kie atendas nin Jean-François, esperantista amiko ŝatanto de bildstrioj kaj tradukinto de pluraj aventuroj de Asteriks'. Li invitas nin por manĝi "bruccheta", italan pladon apenaŭ konata en Francio.

La sola malbonaĵo okazas la morgaŭon, kiam ni maltrafas intervjumon en la ĵurnalo Nice Matin pro miskompreno pri la rendevua horo.



(sekventa)



Ateistoj tra la mondo suferas persekuton kaj diskriminacion



Ateistoj kaj aliaj religiaj skeptikuloj suferas persekuton kaj diskriminacion en multaj partoj de la mondo, kaj en almenaŭ sep nacioj povas esti ekzekutitaj se malkovriĝas iliaj kredoj

La studo, de la International Humanist and Ethical Union (IHEU), montris ke “malfideluloj” en islamaj landoj alfrontas la plej severan - iam brutalan - traktadon fare de la ŝtato kaj kredantoj de la oficiala religio. Sed ĝi ankaŭ politikon en iuj eŭropaj landoj kaj Usono, kiu favoras religiemulojn kaj iliajn organizaĵojn, kaj traktas ateistojn kaj humanismojn kiel eksterulojn.

La raporto, “Freedom of Thought 2012”, diras “estas leĝoj kiuj rifuzas al ateistoj la rajton ekzisti, limigas ilian liberecon de kredo kaj esprimo, reprenas ilian civitanecon, kaj rifuzas ilian rajton geedziĝi.”

Aliaj leĝoj “obstrukcias ilian aliron al publika edukado, malpermesas ilin teni publikan oficon, preventas ilin labori por la ŝtato, krimigas ilian kritikon de religio, kaj ekzekutas ilin pro forlaso de la religio de siaj gepatroj.”

La raporton bonvenigis Heiner Bielefeldt, speciala raportisto de la Unuiĝintaj Nacioj pri libereco de religio kaj kredo. Li diris en kurta enkonduko, ke mankas konscio pri la fakto, ke ateistoj estas protektataj de tutmondaj interkonsentoj pri homrajtoj.

La IHEU - kiu ligas pli ol 200 humanismajn, ateistajn kaj sekularajn organizaĵojn en pli ol 40 landoj - diris ke ĝi eldonas la raporton por honori la UN-an Tagon pri Homrajtoj, kiu okazis lundon.

Laŭ ĝia esploro de ĉirkaŭ 60 landoj, la sep landoj en kiuj esprimo de ateismaj vidpunktoj aŭ forlaso de la oficiala religio havas mortpunon, estas Afganujo, Irano, Maldivoj, Maŭritanio, Pakistano, Sauda Arabujo kaj Sudano.

La 70-paĝa raporto ne indikas lastatempajn kazojn de efektiva ekzekuto pro “ateismo” - sed esploristoj diras ke la krimo estas ofte kunfandita en aliajn akuzojn.



En diversaj aliaj landoj - kiel Bangladeŝo, Egiptujo, Indonezio, Kuvajto kaj Jordano - eldono de ateismaj aŭ humanismaj vidpunktoj pri religio estas tute malpermesata aŭ strikte limigata sub leĝoj kontraŭ “blasfemo”.

En multaj el tiuj landoj, kaj aliaj kiel Malajzio, civitanoj devas registri sin kiel sekvantojn de malgranda nombro da oficiale agnoskataj religioj - kiuj normale inkludas nur kristanisman, judisman kaj islaman.



Fazil Say, la fama turka pianisto, ekzilu tiujare de sia lando pro siaj ateistaj vidpunktoj.

Ateistoj kaj humanismoj estas tiel perfortitaj mensogi por akiri siajn oficialajn dokumentojn, sen kiuj maleblas ĉeesti universitaton, ricevi medicinan flegon, vojaĝi eksterlanden aŭ konduki aŭton.

La IHEU diris ke Eŭropo, sub-sahara Afriko kaj Latina/Norda Ameriko, landoj kiuj priskribas sin sekularaj, favoras kaj donas privilegiojn al kristanismaj eklezioj. En Grekujo kaj Rusujo, la Ortodoksa Eklezio estas forte protektata kontraŭ kritiko, kaj ricevas specialan statuson en ŝtataj eventoj, dum en Britujo, episkopoj de la Eklezio de Anglujo havas aŭtomatan seĝon en la Palaco de Westminster.

Dum libereco de religio kaj parolo estas protektata en Usono, diris la raporto, socia kaj politika klimato superregas “kiu igas ateistojn kaj la nereligiemajn senti sin malpli valoraj usonanoj, aŭ neusonanoj.”

En almenaŭ sep usonaj ŝtatoj, konstituciaj principoj baras ateistojn de publika ofico, kaj unu ŝtato, Arkansaso, havas leĝon kiu malpermesas ateistojn fari atestojn en tribunalo aŭ kortjuĝumo, diris la raporto.

Raportita de **Robert Evans**

Ateismo estas grekdevena vorto, kiu signifas **sendiismon** aŭ **di-neismon**, do ke oni ne kredas je la ekzisto de ia dio.

Laŭ taksoj proksimume 2,5% de la monda loĝantaro klasifikas sin mem kiel ateistoj, kaj proksimume 12,8% kiel nereligiaj (laŭ Encyclopædia Britannica).

Ĉi tiuj procentaĵoj estas ĝenerale pli altaj en eŭropaj kaj eks-socialismaj landoj, kaj pli malaltaj en Usono kaj evoluantaj landoj.

La efektiva procentaĵo de ateistoj eble estas pli alta ĉar personoj kiuj respondas al opiniondoj ofte estas hezitemaj malkovri sin mem al eblaj leĝa, ekonomika aŭ socia diskriminacioj.

(...)



La estonteco certe ne estos enua

Intervjuo kun Peter Baláž, la Esperantisto de la Jaro



En la januara «Ondo», ni informis (NdlR: ankaŭ en la januara Aktuala ;-)), ke la 33-jara slovaka aktivulo Peter Baláž, kunordiganto de la asocio Edukado@interreto (E@I) estas proklamita la Esperantisto de la Jaro 2012. Hodiaŭ li estas nia gasto.

(...)

Ni aŭdis, ke via nomumo vekis intereson de la amaskomunikiloj en Slovakio. Kio okazis?

Jes, efektive aperis pluraj artikoloj pri mia premiigo, ĉefe en la retaj novaĵ-portaloj. Pri tio mi povas danki ĉefe al slovakaj esperantistinoj Katka Nosková kaj Eva Fitzelová, kiuj verkis gazetaran komunikon kaj dissendis ĝin al amaskomunikiloj. Pluraj el ili aperigis la informon. Persone mi tion prenas kiel bonan ŝancon videbligi Esperanton, pri kiu oni ja ne ĉiutage informas. Do la premio iĝis ankaŭ bona reklamo por Esperanto en Slovakio.

La asocio E@I, kiun vi kunordigas, havas sidejon en Slovakio, sed ne vi fondis ĝin. Kiel vi fariĝis estrarano?

E@I ekestis en 1999 kiel neformala laborgrupo de junaj esperantistoj, sub TEJO. Ĝia aktivado iom post iom kreskis ĝis tia grado, ke en la jaro 2005 pluraj aktivuloj eksentis bezonon de propra organizo, kun pli vastaj agadkampoj kaj homforto. Mi ekaktivis en E@I en 2003 (en tiu jaro mi ankaŭ fondis mian etan

eldonejon: Espero), kaj en 2005 unu el kunfondintoj de ĝi kaj de lernu.net, Hakan Lundberg, proponis al mi transpreni la kunordigadon. Mi tre ŝatis la tiaman agadon kaj akceptis la taskon, tute ne antaŭvidante, kion ni estonte faros. Ni decidis registri la organizon kaj eklabori memstare pri pluraj Esperanto-projektoj.

Ekde tiu tempo mia vivo estas forte ligita kun Esperanto.

Kiel E@I malsamas de la tradiciaj organizoj? Ĉu ĝia modelo havas ankaŭ malavantaĝojn?

Kompare kun “tradiciaj organizoj” ni estas ĉefe “projktbazita organizo” – ni elpensas, kreas unuopajn (ofte tute malsamajn) projektojn, por kiuj serĉas aparte teamojn, financojn, enhavon ktp. La membreco en E@I estas senpaga, tamen pluraj projektoj (ekzemple: lernu.net) bezonas enspezojn – ankaŭ tial ni relative ofte okazigas monkolektajn kampanjojn, al kiuj povas homoj kaj organizoj kontribui. Sed tiu ĉi modelo (“crowd sourcing” = komuna/amasa financado), bedaŭrinde ne estas tiom konata, ke ĝi sufiĉu por nia agado. Tial ni estas dankaj al ESF, kiu dum dek jaroj subtenas diversajn niajn projektojn. Eblas diri, ke sen ESF jam E@I ne ekzistus aŭ realigus nur minimumon de la ĝisnuna agado.

Kion, laŭ vi, aparte bezonas junaj esperantistoj? Kial ili nun tiom amase venas al serioza kursaro kiel Somera Eo-Studado (SES) aŭ eĉ scienca konferenco kiel Kaest ?

Nuntempaj junaj esperantistoj laŭ mi bezonas la samon, kiel ĉiuj antaŭaj – kuraĝigon, subtenon, ekzemplajn

modelojn, kelkfoje konsilon kaj spacon por propra sinrealigo. Se ni sukcesas al ili liveri tion, la movado povas kreski, progresi kaj modernigi.

Al SES venas homoj ĉefe por lerni Esperanton – estis strange, ke ne ekzistis granda eŭropa somera Esperanto-lernejo. Do ni decidis proponi ĝin, kaj dum kelkaj jaroj ĝi famiĝis kaj tradiciigis. Ĉiu trovas en SES ion por si, ĉu komencanto, ĉu la plej sperta esperantisto. Kaj proponi SES-on al la lernantoj de lernu.net montriĝis tre bona maniero enmovadigi tiujn homojn – tion ni efektive sukcese faras dum lastaj jaroj. Forta flanko de SES estas la taŭga mikso de “seriozeco” (antaŭtagmeza lernado de Esperanto), tradicia Esperanto-programo (prelegoj, manlaboroj, ludoj, ekskursoj) kaj amuziĝo (teatraĵoj, koncertoj, diskotekoj).

KAEST estas alia; tien venas homoj, kiuj interesiĝas pri scienco kaj tekniko kaj emas pri tio diskuti en Esperanto. Estas domaĝe, ke ne ekzistas pluraj tiaj aranĝoj tra la mondo – sen bona kaj moderna terminologio kaj faka uzo de la lingvo ĝi ne vere povos progresi.

Oni rimarkas, ke projektoj de E@I okupiĝas ne nur pri Esperanto.

Jam en 2005 ni sciis, ke en E@I ni okupiĝos ne nur pri Esperanto, kaj tial la oficiala nomo estas “Edukado@Interreto”, anstataŭ la originala “Esperanto@Interreto”. Ankaŭ celoj de la organizo laŭstatute pri tio klare diras:

“La vizio de E@I estas paca kaj harmonia mondo en kiu ĉiuj civitanoj povas facile kaj rapide komuniki tutmonde. La ĉefaj celoj por atingi tion estas:

- instigi interkulturan lernadon kaj internaciajn kunlaboron kaj komunikadon;

- subteni lernadon kaj uzadon de interretteknikoj kaj lingvoj;
- helpi validigadon de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj ties Deklaracion de homaj rajtoj”.

Certe, la plej gravan rolon por ni havas kaj havos Esperanto. Sed ni volas utiligi nian sperton por krei utilajn projektojn ankaŭ por aliaj – kaj ankaŭ per tio montri, ke esperantistoj ja kapablas fari ion bonan, utilan kaj praktikan ankaŭ por la “ekstera” mondo.

Tiel ĉi ekestis la retejo por instrui la slovakajn lingvon: www.slovake.eu, kaj nun estas kreata retejo por instrui la germanajn lingvon: www.deutsch.info. Kaj venos ankaŭ aliaj.

Se E@I sukcesos proponi plurajn lingvoinstruajn retejojn, ankaŭ opinio pri Esperanto povas por pluraj homoj ŝanĝiĝi. Ekzemple neniu povas nei, ke ĝuste esperantistoj kreis la unuan multlingvan retejon por instrui la slovakajn. Kiam aperis gazetara komuniko pri [slovake.eu](http://www.slovake.eu), ni klarigis, ke la projekto ekestis surbaze de spertoj pri lernu.net por instrui Esperanton. Oni menciis tion en la amaskomunikiloj, kaj dum sekvaj tagoj venis pli multaj vizitantoj ankaŭ al lernu.net.

Danke al nia engaĝiĝo al edukado-projektoj E@I decembre iĝis membro de “Civitana platformo por multlingvismo” ĉe la Eŭropa Komisiono.

Krom edukado kaj interreto, vi agas por Esperanto ankaŭ ĉe eŭropa nivelo, precipe per Eŭropa Esperanto-Unio (EEU).

En 2005 mi iĝis estrarano en ambaŭ organizoj: EEU kaj E@I. Laŭ mi ĝuste Eŭropo povas esti ŝlosila areo por disvastigi Esperanton en pli granda skalo – pro diversaj kialoj politikaj, sociaj, lingvaj,

geografiaj... Mi ne komprenas esperantistojn, kiuj fervore kontraŭas la ideon, ke Esperanto iĝu lingvo uzata en EU – ili argumentas per tutmondeco de la lingvo. Sed ja ankaŭ Eŭropo estas parto de la mondo! Kaj se Esperanto iĝus oficiale uzata ĉi tie, mi garantias, ke amaso da aliaj landoj kaj mondopartoj sekve ekuzus/ eklernus ĝin – kio helpas al la lingvo rapide transiri de iu “eŭropa lingvo” al tutmonde uzata, komuna por ĉiuj. Simple ne eblas transalti iujn evolu-ŝtupojn. Mi preferus, ke la lingvon uzu duonmiliardo da eŭropanoj, ol kelkmil homoj tra la tuta mondo. Ĉar tuj post kiam ĝin oni praktike ekuzas en EU, aliaj mondopartoj (ekzemple, Suda Ameriko kaj Ruslando) aldoniĝus tre rapide – same kiel oni nun uzas la anglan en diversaj mondopartoj (eĉ kie tio estis nepensebla antaŭ kelkaj jaroj), oni ekuzas aŭtomate Esperanton.

Paradokse, la nuna financa krizo (verdire, morala krizo de valoroj) povas helpi al Esperanto (ankaŭ al aliaj alternativaj movadoj, solvoj). Nur en la malfacila tempo oni ekserĉas solvojn, komencas pli serioze trakti problemojn; kaj Esperanto ja estas unu el taŭgaj solvoj por pluraj niaj problemoj. Necesas nur pacience kaj tamen profesie ĝin prezenti – en ĝusta maniero kaj momento.

Kio inspiras vin daŭrigi vian laboron?

Eblus diri: “interna ideo”. Pli precize, iu interna sento, ke mi faras ion utilan, sencohavan kaj prosperan. Mi havas senton, kiun esprimis foje Claude Piron, ke Esperanto estas *tiom* bona inventaĵo, ke ĝi iam (pli aŭ malpli frue) devos amase disvastiĝi tra la mondo. Kaj al tio mi per mia agado volas helpi.

Mia unua instigo por okupiĝi entute pri Esperanto estis la libro «Ni ne estas senpovaj» de la slovaka aŭtoro Marian

Repka. Ĉi tiu libro ŝanĝis mian tutan vivon. Kiam mi legis ĝin, mi sentis, kvazaŭ la libro estus verkita por mi. En ĝi estas priskribita kvinpaŝa vojo por atingi pacon en la mondo. Kaj la unua paŝo estas “lerni la internacian lingvon Esperanto”. Mi ekinteresiĝis pri la temo kaj eklernis. Mi jam pli frue konis la aŭtoron (verkantan ĉefe esoterajn librojn), kaj pere de meditado (kiu estas la kvina paŝo por atingi la pacon en la sama libro) mi venis al Esperanto. Ekde tiu tempo mi provas kontribui al la realigo de paco.

Supozeble, vi okupiĝas ne nur pri viaj labortaskoj. Kion vi faras libertempe, kiam vi havas la eblon respiri?

Efektive mia Esperanto-agado uzurpas nun plejmulton da mia tempo. Aliflanke ekzistas proverbo: “Faru kion vi amas, kaj vi neniam plu devos iri labori.” Tio ĉi vere validas por mi – mi jes laboras relative multe, sed malofte mi sentas, ke mi laboras. Mi pasie okupiĝas pri Esperanto, do ne estas iu sufero labori, mi ofte ŝanĝas la taskojn, do ili ne povas facile enuigi min.

Tia ĉi vivstilo jes ja havas ankaŭ negativajn flankojn – ĉefe ĝi influas mian privatan vivon. Ofte ne facilas por proksimuloj elteni tian labordependulon.

En “libera” tempo (kiam mi ne okupiĝas pri Esperantaj taskoj) mi foje ŝatas spekti filmojn (ĉefe scienc-fikciajn), aŭskulti muzikon (ofte metalan), legi librojn (pro mia pasio pri libroj mi eĉ fondis eldonejon). Aldone mi okupiĝas pri esplorado de la homa konscio (pli facile dirite: meditado) kaj finfine ĉi-jare rekomencis pli aktive sportumi.

Kvankam niaj aktivuloj okaze de intervjuo kutime prezentas Esperanton kaj Esperantujon alloga kaj moderna, en

internaj esperantistaj diskutoj oni konstatas multe da pesimismo kaj defetismo, ĉefe pro la stagnado aŭ krizo en la tradiciaj movadaj strukturoj. Kion vi opinias pri la nuna stato kaj estonteco de Esperanto?

Malgraŭ ĉiuj plendoj kaj signoj de stagnado mi estas optimisma – Esperanto laŭ mi kreskos pli kaj pli – eble alimaniere, ol kelkaj imagas. Certe malfortiĝas la tradiciaj strukturoj, sed aliflanke kreskas abunde tute novaj vojoj, ebloj por praktiki la lingvon.

Laŭ mi, nun Esperanto kaj ĝia movado trairas iaspecan purgatorion. Kiom longe ĝi daŭros, dependas de ni mem – aktivuloj kaj movadanoj, Esperanto-uzantoj. Niaj hodiaŭaj decidoj influas la aspekton de la morgaŭa Esperanto-movado. Ankaŭ la problemoj de la ekstera mondo povas kontribui al pli rapida disvastiĝo de Esperanto. Ofte ni forgesas provi alparoli aliancinojn – kaj dum lastaj jaroj daŭre kreskas kvanto de alternativaj movadoj, kun kiuj estus utile kunlabori por atingi niajn celojn. Ankaŭ la ekstera mondo evoluas, do estus naive pensi, ke nia movado povas resti sama, dum ĉio ĉirkaŭe ŝanĝiĝas.

Neevitebla demando: kiujn tri librojn en Esperanto vi kunprenus al neloĝata insulo?

Dependas de cirkonstancoj. Mi preferus kunhavi iPad aŭ alian e-legilon kun sunenergia ŝargilo kun amaso da ciferecaj Esperanto-libroj ene. Se tio ne eblus, kaj mi tutsola devus tie resti, tiam simple estu tri tre dikaj libroj, romanoj, por ne tro enui. Alikaze, se estas ŝanco de tie eskapi aŭ havi kompanion, mi preferus kunhavi PIV kaj PMEG apude, aldone eble verkon *Ni ne estas senpovaj* de Marian Repka (kiu venigis min al Esperanto) aŭ tradukon de

paroloj de Jiddu Krishnamurti (en Esperanto estis eldonitaj du liaj libroj laŭ mia scio).

Kaj, fine, pri viaj planoj?

Planoj ne mankas – male, kutime ili eĉ troas. Nia filozofio ĉiam estas realigadi projektojn, kiuj mankis, ni strebas “plenigi la truon”. Samon ni volas daŭrigi, en la spirito de la mesaĝo de Gandhi: “Estu la ŝanĝo, kiun vi volas vidi en la mondo”.

Do ĉi-jare aperos la rekonstruita lernu.net kaj deutsch.info, finfine ekfunkcios aktuale.info, verŝajne estos lanĉita nova aranĝo-retejo kaj vendejo.net, plifortiĝos kunlaboro pri Vikipedio, somere okazos SES-2013. En 2014 probable okazos SES eĉ en tri landoj: Brazilo, Slovakio, Ruslando, kaj ni volus estonte okazigadi SESon en diversaj mondopartoj por ebligi al pli da homoj partopreni someran Esperanto-lernejon. Baldaŭ okazos elektoj por la nova estraro.

Mi planas ankaŭ pli aktive okupiĝi pri eldonado de Esperanto-libroj (kaj papere kaj ciferece), ekzemple ni lanĉas ideon de reeldono de valoraj malnovaj Esperanto-verkoj.

Mi ankaŭ planas pli engaĝiĝi en aliaj, neesperantaj aktivecoj (kiuj tamen havas proksiman rilaton al Esperanto), ekzemple: vegetaranismo/veganismo, meditado, ekoloĝado, Vikipedio...


La estonteco certe ne estos enua.

Intervjuis **Aleksander Korĵenkov** kaj **Marek Blahuš**



Amikejo: la Esperanto-lando kiu preskaŭ ekzistis

Neŭtrala Moresneto estis malgranda kvazaŭregno, ekzistinta nur pro tio ke ĝiaj du grandaj najbarlandoj ambaŭ deziris la areon de ĝia valora zinkominejo. La landeto ekzistis dum pli ol cent jaroj, de 1816 ĝis 1919, sed post la elĉerpiĝo de la zinkominejo en 1885 aperis duboj pri la pretervivo de Neŭtrala Moresneto. Pluraj ideoj estis proponitaj por pli aŭtonomigi ĝin. La plej rimarkinda iniciato venis de D-ro Wilhelm Molly (la mineja kuracisto), inspirita de Gustave Roy, ambaŭ framasonoj: ili celis igi Moresneton la unua Esperanta regno, nomota "Amikejo". La nova regno estis proklamita en aŭgusto 1908, tamen neniu ŝtato, nek la Esperantomovado, prenis la proklamon vere serioze. De post la unua mondmilito Moresneto estas parto de Belgio. Jens S. Larsen detale esploris la historion de la efemera Esperanto-regno.



Bildkarto pri Moresnet

Verŝajne malmultaj scias ke iam dum periodeto estis komuna limo inter Danio kaj Francio. Sub la reĝo de Napoleono Francio etendis sin ĝis la ĉe-Balta urbo Lubeko, dum Holstinio estis duklando sub la dana krono. Aliflanke, sendube ĉiuj scias ke Napoleono renkontis sian finan malvenkon ĉe Waterloo en 1815, farinte la plej sensacian politikan revenon de la monda historio el sia kaptiteco sur la insulo Elbo.

Tiu evento teruregis ĉiujn Eŭropajn regantojn, kiuj estis kolektitaj en la Viena kongreso por digi Francion kaj redesejni la landlimojn de la kontinento. Ĉar Danio antaŭe estis aliancano kun Francio, Norvegio estis transigita el Danio al Svedio. Male Prusio estis militinta kontraŭ Napoleono kaj rekompence ricevis grandajn partojn de la nuna okcidenta Germanio.

Napoleono siatempe dissolvis la tiel nomatan Sanktan Romian Imperion de Germana Nacieco (kiu laŭ Voltero estis nek sankta, nek Romia, nek imperio) kaj anstataŭe kreis la Reĝnan Federacion kiel klientan ŝtaton. Kompense por tio, la Viena kongreso formis la Germanan Federacion, malstrikatan konfederacion kun du dominantaj membroj, nome Prusio kaj Aŭstrio. Oni ankaŭ interkonsentis fondi la tiel nomatan Unuigitan Reĝlandon de la Malsupraj Landoj, bufroŝtaton inter Francio kaj Prusio. Luksemburgio estis organizita kiel duklando sub la Germana Federacio en persona unio kun la Malsupraj Landoj, t.e. la reĝo de tiu lando estis samtempe la duko de la najbara lando (simile kiel Holstinio, kies duko estis la Dana reĝo).

Mikroŝtato kreigaŝ

La personaj unioj ne estis la sola ekzemplo de tio ke ankoraŭ ne enradikiĝis la modernaj ideoj de demokratio kaj naciismo. Metonte la limon inter la Malsupraj Landoj kaj Prusio, neniu ekpensis demandi la loĝantojn per plebiscito; la linio estis diktita en la fina dokumento de la Viena kongreso. Sed en unu loko, norde de la ŝoseo inter la urboj Aĥeno kaj Lieĝo, ekestis konflikto pri interpreto. Ĝuste tie troviĝis altvalora zinka


minejo, kiun ambaŭ landoj pretendis. Oni formis komunan komisionon, kiu renkontiĝis 50 fojojn ne atingante konkordon. Finfine lacigitaj de la traktado, la du partioj interkonsentis meti limpalisojn ambaŭflanke de la mineja teritorio, kaj administri kune la rezultantajn 344 hektarojn da neŭtrala teritorio. La intertraktantoj evidente estis tre elĉerpitaj, ĉar en almenaŭ unu loko la limo estis metita rekte tra domo!

La malgranda enklavo situas en regiono kie la parola lingvo transiras de Germana al Nederlanda dialekto, sed tuj okcidente oni parolas France, tiel ke multaj lokaj nomoj havas malsaman formon Germane, Nederlande kaj France. La zinka minejo do estis konata Germane kiel *Altenberg* kaj France kiel *Vieille Montagne*. La vilaĝo kie loĝis la ministroj nomiĝas respektive *Kelmis* kaj *la Calamine*, kiuj cetere estas loka nomo de zinka erco. La minejo situas inter la malgranda urbo *Moresnet* okcidente kaj la eĉ pli malgranda vilaĝo *Neu-Moresnet* oriente, do tial la enklavo estis konata kiel *Moresnet neutre Franclingve, Neutraal Moresnet Nederlande kaj Neutral-Moresnet Germane* – kaj “*Neŭtrala Moresneto*” en *Esperanto*. Evidente, la urbonomo uzas la samajn literojn en ĉiu el la tri lingvoj, sed kvankam ĝi klare estas Francdevena, estas tre varie kiagrade *t* kaj *s* estas elparolataj aŭ ne!

Insulo de stabileco

La neŭtraleco de Moresneto laŭintence estus nur provizora aranĝo, sed ĝi persistis dum pli ol jarcento. Kontraŭe, la Unuigitaj Malsupraj Landoj baldaŭ devis rezigni pri sia unueco. Se oni iom konas la fifaman belgan lingvo-konflikton, oni facile imagas ke la Nederlandlingvaj Flandroj estus Protestantoj kaj ke la Franclingvaj Valonoj estus Katolikoj, sed fakte tuta Belgio havas solidan Katolikan plimulton (kiu cetere

etendiĝas sufiĉe malproksimen en Nederlando). De la Reformacio ĝis la Napoleonaj militoj la nordaj malsupraj landoj estis memstaraj, dum la sudaj estis submetitaj al Hispanio kaj poste al Aŭstrio. La registaro en Amsterdamo provis ligi al si la Flandrojn farante la Nederlandan oficiala kaj lerneja lingvo en la flandraj regionoj, sed la flandroj ne estis logeblaj; nur en la 20a jarcento la lingva konflikto vere varmiĝis. En 1830 la katolikaj, flandraj kamparanoj unuiĝis kun la liberala, franclingva elito kaj efektivigis la Belgan revolucion.



Mapeto de Moresneto

1. La Malsupraj Landoj : Limburgo → Nederlando
 2. La Malsupraj Landoj : Belgio
 3. Neutra Moresneto
 4. Prusio → Germanio
- a. Nederlanda-Belga limo de post 1839
b. La ŝoseo Aĥeno-Lieĝo
c. Belga-Germana limo de post 1920

(Sekvenda)

Esperanto en novepokaj diskoj

PRINTEMPO
PABLO PELÁEZ



“Printempo” estas la titolo de la nova disko de la pianisto **Pablo Peláez**, kiu lanĉigas ĝuste dum tiuj ĉi tagoj. La titolo ne estas traduko: temas ĝuste pri esperantlingva vorto, kaj ankaŭ en Esperanto aperas la titoloj de la unuopaj pecoj. Vi povas ĝin vidi, kaj aĉeti surrete (*Ndlr : bv tajpi «gotatdeltiempo pablo pelaez», kaj vi trovos la ligilon*).

En la fizika disko la albumtitolo aperas nur en Esperanto, dum la pecoj havas versiojn paralelajn. Tie publikiĝas ankaŭ dulingve teksto pri Esperanto, kiu klarigas la kialojn por la uzo de tiu ĉi lingvo. En la retejo tiu aperas nur hispanlingve.

La lingvaĵo estas novepokeca, kaj mi tradukas la komencon:

«En la komenco de la tria jarmilo, la Homaro devas proponi al si mem universalajn celojn ampleksantajn la tutan planedon; tiurilate mi proponas ĉi universaleman lingvon kiel metaforo ke ni estas parto de granda tutmonda komunumo bazita sur esenca konsento: nia natura biologa altruismo kaj la bezono por ni kiel individuoj esti parto de homaj grupoj...»

Ankaŭ la muziko apartenas al tiu ĝenro (kiom mi kapablas taksi, laŭ miaj ne tre

altaj muzikaj kapabloj). Oni povas aŭskulti specimenon en jena peco :

-> (*Ndlr*) *Bv tajpi «Pelaez live in Panama» ĉe YouTube aŭ sekvu tiun ĉi ligilon:*

<http://www.youtube.com/watch?v=HNQ74qHBtBo>



Mi mem ne estas novepokema, kaj fakte ne tre ŝatas la ne maloftan asociiĝon de Esperanto kun tiaj religiecaj tendencoj. Kaj tion mi klarigas ĉar, nu, mi mem zorgis pri la tradukado de la tekstoj. Sed la aŭtoro estis afabla kaj la muziko estas sufiĉe agrabla kaj trankviliga. Do, kial ne?

KvaropoSinkopo

Sinkopo intenca misloĝado de la regula akcento (PIV2)


Kaj se vi deziras ĝui alian agrablan kaj trankviligan muzikon, ĉifoje ja kantatan en Esperanto, jam disponeblas ankaŭ la unua disko de **Kvaropo Sinkopo** (*Ndlr, ĉe Youtube*), “Bonvenon al la kongres”, registrita dum la Hispana Konfreso de Almagro. Tiu ĉi ne estas novepokeca, sed ĝi ja montras alian novan epokon pro la maniero ĝin akiri, el fizika kaj ankaŭ mona vidpunkto: simple aliru la retejon <http://sinkopo.bandcamp.com/>, kie oni povas ĝin aŭskulti aŭ elŝuti, senpage aŭ kontribuante volontan prezon. Ĉiukaze, ĝuu.

La Blogo de Tonyo (Tonjo del Barrio)

° **Novepoka muziko** (NdlR : «*New Age muziko*» aŭ kelkfoje nomita «*Spaca muziko*») estas ĝenro de muziko originale ligita kun iuj novepokaj kredoj. Ĝi estas bazita sur la verkoj de diversaj eŭropaj kaj amerikaj elektronikaj kaj akustikaj muzikistoj.

Ĝi estas ĝenerale karakterizita kiel ĉefe instrumenta kaj melodie ripetema. Registraĵoj de natur-sonoj iufoje estas uzataj en ĉi tia muziko. Novepoka muziko estas konsiderata kiel trankviliganta kaj inspiranta, tial ĝi ofte estas uzata de aŭskultantoj dum jogo, masaĝo, meditado, legado, aŭ por krei paca etoso.

Jen kelkaj muzikistoj kiuj estas ofte rilatigitaj al tia ĉi muziko: Andreas Vollenweider, Bradley Joseph, Enya, Era, Jean-Michel Jarre, Kitaro, Mike Oldfield, Deep Forest, Peter Gabriel, Suzanne Ciani, Jean Ven Robert Hal, Ryuichi Sakamoto, Tangerine dream, Yanni, Vangelis, ..



« Voĉoj de la Tempo » de Eduardo GALEANO

La suno

Ie en Pensilvanio, Anne Merak laboras kiel asistento de la suno.

Tiom longe, kiom ŝi memoras, ŝi ĉiam okupis tiun postenon. Ĉiumatene, Anne levis la brakojn kaj puŝis la sunon por ke ĝi leviĝu en la ĉielon ; kaj ĉiuvespere, ŝi mallevis la brankojn por kuŝigi ĝin ĉe la horizonto.

Ŝi estis tute eta, kiam ŝi alprenis tiun taskon, kaj ŝi neniam neglektis ĝin.

Antaŭ duona jarcento oni deklaris ŝin freneza. De tiam, Anne pasis tra pluraj aziloj, ĝi estis traktata de multnombraj psiĥiatroj kaj glutadis eksterordinarajn kvantojn de piloloj.

Ili neniam povis sanigi ŝin.

Bonŝance.

Verdaj Skoltoj



Ni estas eta grupo da junuloj kiuj volas praktiki Esperanton kaj skoltumi.

Ni venas de Bruselo, Flandrio, Francio, Germanio, Luksemburgio kaj Valonio. Esperanto estas nia sola komuna lingvo !

Skoltismo estas, kiel Esperanto, tre malnova ideo. Ĝi evoluis kaj estas nun sufiĉe malsama kiel en 1900. Same kiel Esperantio. Des pli ke ni kune adaptas ĝin al la bezonoj kaj deziroj de la partoprenantoj. Eble estas malfacile esperantigi la skoltojn, do kial ne skoltigi la esperantistojn?

Tio ekis per semajnfina kunveno en novembro 2012 (Jes, ja ni estas tre tre juna grupo). Ni ekskursis en Lieĝo en decembro. Kaj nun havas ambician programon por 2013: kvar semjanofinoj kaj unu semajno de tendumado !



Jen ĝojaj « verdaj skoltoj »

Ĉiumonate ni renkontiĝas, interkomunikas per Esperanto, amuziĝas, malkovras novajn lokojn en Belgio ...

Ĉiuj adoleskantoj estas bonvenaj !

Samy

Retpaĝo : <http://verdajskoltoj.wordpress.com>

Pli da informoj ĉe Valer : doumontvalere@yahoo.fr